Malmö 22/6 1945.

Al Lennart Åberg
S k ö v d e (nur al li)

Ek al

- Dankon pro la letero

- Svantesson havas grandan intereson pri la gazeta afero. Domaĝe ke oni ne povas informi lin pri la vera kaŭzo rilate al Bernhard Eriksson - almenaŭ ne en la nuna momento. Mi samopinias kun vi, ke Svante ne estas ideala redaktoro, sed sincere dirite: la afero ne temas pri nova redaktoro. Ni serĉas nur presejon kaj krome personon, kiu povas esti kontaktulo por la presejo. La redaktoro daŭre estu en la centra loko - do Stokholmo. Transdoni manuskriptojn al iu presejo ne estas malfacila laboro, sed devas esti kontaktulo, kiu estu kapabla mem fari ion en la lasta momento kaj eĉ legi la presprovaĵojn.

- Mi ege substrekis la gazetan demandon kaj daŭre substrekas. La lastan numeron la malmöanoj ricevis hieraŭ, do unu tagon post la naskiĝotago de Nylén (nu, por la klubo ne gravas, ĉar ĝi jam sendis rostostangan kukon (-spettkaka -)al Nylén).

- Mi resendas la afiŝskizojn laŭ via peto kaj esperas, ke vi trovos vian amikon Graemborn.

- Pri via letero 15.6 : Mi intencas poste reveni al tiu letero, sed laŭ peto mi jam nun informas, ke via propono pri gazetpeto pri komuna laboro rilate al gazetartikoloj nepre okazu kaj efektiviĝu. Sed - ni ne aranĝu konkurson. Ni nur petu la gesamideanojn sendi artikoletojn antaŭ 15/8. Mi petas vin jam nun skribi kelkejn liniojn pri tiu afero kaj sendi al Sv.Esp.Gaz., kiu bezonas minimume 3-4 semajnojn por presprovaĵo (skandalo!). La julia numero do aperos en la fino de julio, kaj pro la ĉiama malfruiĝo de la gazeto la estraro devas kunsidi plej malfrue 15/8 en Stokholmo (nepre!). La esperantistoj kunhelpos sen premioj. Pri la "Barometro" mi ankoraŭ ne estas preta definitive respondi. Prte pro tio, ke nun temas nur pri Amikaro de SEF, parte pro tio, ke ni ankoraŭ ne fiksis la definitivan laborsistemon por la estonta monkolektado. Sed mi revenos.

- Por la afiŝoj nepre la plimulto 70 x 50 cm.

- Vi estas bonŝanculo kiu havas libertempon sone re. Tian mi neniam ricevis kaj ne ricevos almenaŭ ne dum la venontan 10-15-20 jaroj

- Cetere rapidajn salutojn

de